

Milward P & Nakano K (1992) The Tower of London. Brighton, UK: In Print Publishing. Traduko de London-Too verkita de S Natsume.

Nagata H (2003). Judgments of grammaticality of Japanese sentences violating the principle of Full Interpretation. *Journal of Psycholinguistic Research*, 32, 693-709.

Nagata H (2004) Faulty Japanese sentences are judged more grammatical when punctuation is used: Negative implications for Chomsky's principle of Full Interpretation. *Perceptual and Motor Skills*, 99, 325-336.

Nagata H (2005a) Deveno de denaskismo pri lingvoakiro de Chomsky. *Scienca Revuo*, 56, 81-86.

Nagata H (2005b) Konstanta stato kiel lingvosocio ĉe Chomsky: Ĉu ĝi estas efektive stabila kaj unuforma? *Scienca Revuo*, 56, 127-136.

Nagata H (2007) Kunekzisto de formalismo kaj mensismo/realismo en la genera gramatiko de Chomsky: Kaŭzanto de teoriaj debatoj. *Scienca Revuo*, 58, 99-110.

Natsume S (1905) London-too. 74-a preso en 2004. Tokio: Shinchosha.

Newmeyer FJ (1983) Grammatical theory: Its limits and its possibilities. Chicago, IL: University of Chicago Press.

Nishi S (1960) La Turo de Londono. Tokio: JEI. Traduko de London-Too verkita de S Natsume.

Radford A (1999) Minimalist syntax: Exploring the structure of English. Cambridge, UK: Cambridge University Press.

Shibata T & Yamada S (2002) Ruigo daijiten [Granda vortaro de sinonimoj.] Tokio: Kodansha.

Smith N (1999) Chomsky: Ideas and ideals. Cambridge, UK: Cambridge University Press.

Tomasello M (1999) The cultural origin of human cognition. Cambridge, MA: Harvard University Press.

Tsujimura N (1996) An introduction to Japanese linguistics. Oxford, UK: Blackwell.

Wechsler S (1995) The semantic basis of argument structure. Stanford, CA: Center for the Study of Language and Information.

Adreso de la aŭtoro

Prof. Hiroshi NAGATA

Department of Clinical Psychology

Kawasaki University of Medical Welfare

288 Matsushima, Kurashiki 701-0193 / JAPANIO

<hinagata@mw.kawasaki-m.ac.jp>

Priaŭtora informo

La aŭtoro estas profesoro pri psiĥologio kaj speciale studas psiĥolingvistikon rilate al lingvosocio kaj ties akirado fare de denaskaj parolantoj.

Ĉu Turkoj povas lerni Esperanton?

– Lingvosistemo kaj gramatiko –

Gerald TUCKER

Ni jam konstatis (SR 2/2008) ke la analizo de la relativa malfacileco de ses gravaj hindeŭropaj cellingvoj sur la kampoj de fonologio, ortografio kaj intonacio rezultigas por turka lernanto jenan rangordon (1 = plej facila, 6 = plej malfacila):

1. Esperanto
2. hispana
3. rusa
4. germana
5. franca
6. angla

Tio estas nur ero de la vero. Post pritrakto de la rolo de tiuj (konfesinde tre gravaj) akcesoraĵoj de la lingvo, necesas reveni al la fundamentaj elementoj de lingvoj el la elira kaj celaj lingvoj – la **lingvosistemo**, la **leksiko** kaj la **sintakso**. Necesas tiurilate konstati ke tiu divido validas por ambaŭ lingvofamilioj – la tjurka kaj la hindeŭropa. Se tia trio estas tro simpla por la (almenaŭ germanaj, sed ne nur) filologoj, la kaŭzo estas ke dominas ĉe ili la imago ke „komunikado estas parta aspekto de kulturo“ (Bavara Edukministerio). Pro tio ili ofte neas la prioritaton de la komunikado en la instruado de modernaj lingvoj.

Lingvo fundamente estas plialtigo de komunikaj kapabloj surbaze de la evoluinteco de la parolorganoj, kiuj estas esenca eco de la homa estaĵo. Sekve, kulturo estas plialtigita formo de komunikado, sen lingvo ebla, sed per lingvo rafinebla. Kulturo sen lingvo estas nur socia interagado. Modernaj lingvoinstruaj didaktikistoj tial establis la komunikan prioritaton de lingvoinstruado. La malakcepto de tiu principo en superaj lernejoj kaŭzis ĉe lernantoj komunikajn mankojn, tiel ke ili ofte parolas pli **pri** iu lingvo ol **en** tiu lingvo kaj tamen bezonas tradukiston aŭ interpretiston en ĉiutagaj praktikaj situacioj.

En tiu ĉi studo mi preferas la terminon **lingvosistemo** tial, ĉar la vorto **gramatiko** aplikiĝas al la tuto de la evoluinta formala kaj tradicie konservata sistemaro de semantikaj interrilatoj interne de unu lingvo – kaj tiu “sistemaro” kelkfoje estas rimarkinde „nesistema“. Konfesinde, *F. de Saussure* uzas la terminon **lingvo-sistemo** en senco kiu ampleksas ankaŭ gramatikon laŭ la ĵusa difino. Por tiu ĉi verko la divido de ambaŭ ŝajnas pli oportuna, ĉar la **lingvosistemo** reprezentas la *sinkronan* kernon de lingvo, dum la **gramatiko** altrudas multe da *diakronaj* elementoj.

Tamen, kiel skribis *Chomsky* (*Aspects of the Theory of Syntax*), ĉiu lingvo povas prizorgi sin el komuna “profunda strukturo” (“*deep structure*”). Ankaŭ la lingvoj interkomparataj en tiu ĉi pritrakto havas po lingvostrukturan skeleton. Ĝi ebligas al lernanto interkomunikiĝi eĉ ne regante la gramatikon de la koncerna lingvo. Tiu ĉi **lingvo-sistemo** disponigas elementojn ofte uzatajn en la koncerna lingvo sed ne ĉiam konformajn kun ĝia tradicia gramatiko. Infanoj lernantaj la gepatran lingvon ilin “malkovras” el aŭdataj interparoloj kaj poste kunmetas ilin kun nova vortradiko (transfero) por doni al ĉi tiu la saman interrilatan sencon. Do kiam mia germana lernanto, tradukante la anglan frazon “*Read [ri:d] the text*” (= “Legu la tekston”), diris „*Lese den Text*“, li uzis ĝuste la lingvosistemon de la germana, sed ne sekvis la gramatikan konvencion, kiu postulas la frazon “*Lies den Text*“. Ĉar li koncentriĝis je transporto de la *senco* de la angla frazo en la (gepatran) germanan, li devojiĝis de la *gramatika* realo de ĉi tiu kaj plenumis la *komunikan* taskon je la kosto de la *lingvoformala* tasko. Orientiĝante laŭ imperativoj kiaj “*lege*” (= “kuŝigu”), li formis, laŭ la lingvosistemo, “*lese*“.

Feliĉe la homa cerbo strebas kompreni kaj, se ne malhelpate de antaŭjuĝoj aŭ ideologioj, tolere ignoras multe da formalaj (gramatikaj) eraroj por tiri la komunikan kernon el la dritaĵo.

Por la lernonto de fremda lingvo do, la perceptebleco de lingvosistemo kaj ĝiaj amplekso kaj komplikeco estas la decida kriterio por pli-malpli facila lernebleco. Kiom da elementoj de la lingvo estas parkerigendaj kaj kiom da ili povas esti memstare kombinitaj, decidas pri la necesa okupo de memoro kaj la tempo bezonata por lerni la cellingvon.

Kompreneble ne ĉiuj homoj lernas sammaniere. Tiuj, kiuj ankoraŭ posedas la kapablon intuicie kaj nekogne lerni lingvojn, ne devas okupiĝi pri relativa facileco. Kelkajn homojn ravas ĝuste la apartaĵoj

de lingvo. Kaj kiu lernas lingvon nur por ĝui literaturon, tiu okupiĝas kvazaŭ hobie, eĉ pasie pri la specialaĵoj de la idiomo.

La plej multaj homoj kiuj devas lerni lingvon el fremda lingvofamilio tamen ege bezonas reduktion de la kvanto da lernendaj elementoj. Tial necesas kompari niajn cellingvojn por konstati la relativan (mal)facilecon de la lingvosistemoj.

Feliĉe la turka kaj la cellingvoj havas kelke da komunajoj en la lingvosistemo.

- Ili ĉiuj havas substantivojn, adjektivojn, verbojn kaj konjunkciojn.
- La frazostrukturo konas subjekton (S), predikaton (P) kaj objekton (O) laŭ la variantoj: SPO aŭ SOP aŭ miksformo.
- En ĉiuj estas distingeblaj **vortoj**; Tamen en la turka unuopaj vortoj estas ofte samtempe **frazoj**.
- Ili ĉiuj konas tencojn⁽¹⁾, kvankam ne ĉiuj same amplekse kaj same precize ilin uzas.
- Ili ĉiuj havas komparacion (komparativo kaj superlativo).
- Ili ĉiuj uzas decimalan nombran sistemon kun kardinalaj kaj ordaj nombroj.

Tamen la relativa malfacileco de la cellingvoj por turklingvanoj troviĝas en la grado de superrigardebleco de la diversaj lingvoelementoj.

La objekto de la studo dividiĝas en kvar ĉefdemandojn:

1. Kiom da elementoj la elira lingvo (ĉi-kaze turka, el la tjurka lingvofamilio, do nehindeŭropa lingvo) mem bezonas por plenumi lingvajn taskojn?
2. Kiom da elementoj la cellingvo (ĉi-kaze hindeŭropa lingvo) bezonas por plenumi la samajn lingvajn taskojn?
3. Kiom estas la diferenco?
4. Kion la unuopa cellingvo propedeŭtike ofertas al la nehindeŭropa (ĉi-kaze turka) lernanto?

La kvanta morfologia esploro de la koncernaj lingvoj servu por ilustrati la relativan facilecon de lernado de hindeŭropaj lingvoj por membro de la nehindeŭropa tjurka lingvofamilio. Ankaŭ la manko de lernmalhelpoj povas esti lernhelpilo.

La klopodoj pri verkado de komputilaj tradukprogramoj jam konstatigis ke la morfologia amplekso de la koncernaj lingvoj ludas grandan rolon. Laŭ *Maas* (“Aŭtomata tradukado en kaj el Esperanto“

en „Kibernetiko de la Homa Lingvo“, 1981), “En la kazo de Esperanto la kodado fare de kompilanto estas multe malpli temporaba kompare kun naciaj lingvoj, ĉar en la Internacia Lingvo la morfologio de substantivoj, verboj kaj adjektivoj estas tute regula, tiel ke morfologiaj informoj en Esperanto-vortaro tute mankas. Sufiĉas enmeti radikojn kaj aldoni la sintaksajn informojn.” (Ĉi tie “Esperanto-vortaro” rilatas al unulingvaj morfo-sintaksaj vortaroj por komputila tradukado.)

El tio sekvas ke por homa lernanto de cellingvo la morfologia amplekso de ĉi ties lingvosistemo kun ĉiuj subsistemoj kaj devioj de la sistemo okupas relative grandan parton de la memora kapacito de la cerbo kompare kun la leksika kaj sintaksa memorŝarĝo. Almenaŭ teorie, do, la lingvoj kun la plej malampleksa lingvosistemo ofertas al lernanto el fremda lingvofamilio respondan lernhelparon.

En tiu ĉi verko la leganto ne trovos komplikajn statistikojn kaj transalgebrajn matematikajn formulojn. La fontoj de la studo estas parte sciencaj, parte libroj, kiuj en tre popularscienca maniero helpu al nefakuloj kompreni cellingvajn sistemojn. Turkaj lernemuloj propralande plejparte devas lerni per malmodernaj lerniloj aŭ ĉe instruistoj, kiuj uzas malmodernajn metodojn.

La plej progresintaj metodoj estas uzataj por instrui la “bezonatajn” lingvojn, ĉefe la anglan. Tiuj, kiuj volas lerni por ili pli interesan aŭ pli facilan lingvon, devas fari tion aldone kaj per malpli bona materialo. Tial ili bezonas tiajn verkojn, sur kiaj ĉi tiu studo parte baziĝas.

Per la tekstoj de ĉi tiu amatora provo de kompara interlingvistiko la aŭtoro esperas inspiri verajn lingvosciencistojn en kaj ekster la esperantistaro kontroli kaj eventuale ekspluati la rezultojn. La metodo certe altiros kritikon, sed tiam oni pli science kaj empirie reverku ĝin. Se tio okazos, valoris la peno.

Fontoj

Tucker: Ĉu Turkoj povas lerni Esperanton? – Enkonduko, en Scienca Revuo 2/2008, ISAE, Eschwege

Chomsky: *Aspekte der Syntax-Theorie* (orig.: *Aspects of the Theory of Syntax*), Suhrkamp Verlag, Frankfurt/Main, 1969 (1965)

Culler: *Saussure*, Fontana Press, Glasgow, 1976

Maas: „Aŭtomata tradukado en kaj el Esperanto“ en *Kibernetiko de la Homa Lingvo*, Hungara Esperanto-Asocio kaj Instituto pri Kibernetiko, Budapeŝto kaj Paderborn, 1981

La adjektivo de 5 hindeŭropaj lingvoj laŭ turka vidpunkto

Por konstati la relativan facilecon de hindeŭropa lingvo por turka lernanto en la punkto **adjektivo**, necesas rigardi unue la turkan adjektivon. Kiel epiteto la turka adjektivo estas senfleksia: *güzel kız*, *güzel kızlar* = la **bela** knabino, la **belaj** knabinoj; *güzel kızı*, *güzel kızları* = la **belan** knabinon, la **belajn** knabinojn. La nedifina artikolo, ne esprimata en Esperanto, estas en la turka, laŭ la vidpunkto de la hindeŭropaj lingvoj, intermetata: *güzel bir kız* = (unu) bela knabino.

Predikative la senfleksieco restas (dum la kopulo /estas/ ne ĉiam esprimiĝas): *Kız güzel(dir)*. = La knabino estas **bela**. *Kızlar güzel (dir)*. = La knabinoj estas **belaj**.

La angla adjektivo

La plej grava defio por turko lernonta la adjektivojn en la cellingvoj estas la fakto, ke la sola el ili kiu havas senfleksian adjektivon, estas la angla, kiu tamen prezentas tiun avantaĝon nur en la fundamenta formo, sed ne en la komparacio, al kiu ni poste revenos.

La adjektivo en la angla havas por turko (aŭ alia lingvano) tamen du stumbligilojn: La ortografio estas ankaŭ en ĉi tiu kampo granda obstaklo, kiu manifestiĝas en la akcentoŝanĝoj kaj la sekvaj modifoj de la prononco, ofte sen ŝanĝo de la skribmaniero: *present* (= ĉeest-(ant)a) [ˈprezənt], kp *present* (= prezenti) [priˈzent].

La adjektivo de multaj ĝermanaj ĉiutagaj substantivoj havas latinidan formon: *Hand* (= mano) > *manual* (= mana). La fundamenta adjektivo en la hindeŭropaj lingvoj escepte la anglan indikas genron kaj nombron. Esperanto indikas nur nombron kaj kazon. La germana kaj la rusa indikas krome ankoraŭ la gramatikan kazon. Tiu ĉi fakto kaŭzas jam problemojn por la ceteraj hindeŭropaj lingvanoj, precipe la anglalingvanoj. Des pli ĝi trafas la turkan lernanton.

La Esperanta adjektivo

Ĉe la plej ofta uzado de la adjektivo, nome kiel determinanto de substantivo, la turko (cetere ankaŭ la anglalingvano) konfrontiĝas jam en Esperanto kun finaĵoj kiuj indikas kaj la singularon kaj la pluralon kaj la akuzativon (kiel solan kazon – sed tamen!). Ankaŭ la predikata adjektivo indikas singularon kaj pluralon. Sume la nombro da finaĵoj lernendaj estas kvar (-a, -an, -aj, -ajn). (4 elementoj).

La germana adjektivo

En la turka, la angla kaj germana la predikata adjektivo estas senfleksia: La knabino estas bela, turke *Kız güzel(dir)* (angle *The girl is pretty*; germane *Das Mädchen ist schön*).

La knabinoj estas belaj, turke *Kızlar güzel(dir)* (angle *The girls are pretty*; germane *Die Mädchen sind schön*). La germana epiteta adjektivo tamen havas plurajn finaĵojn:

Vira genro singulara:

germane	turke	esperante
<i>ein guter Mann</i>	<i>iyi bir adam</i>	(unu) bona viro
<i>der gute Mann</i>	<i>iyi adam</i>	la bona viro
<i>eines guten Mannes</i>	<i>iyi bir adamın</i>	de (unu) bona viro
<i>des guten Mannes</i>	<i>iyi adamın</i>	de la bona viro
<i>einem guten Mann(e)</i>	<i>iyi bir adama</i>	al (unu) bona viro
<i>dem guten Mann(e)</i>	<i>iyi adama</i>	al la bona viro
<i>einen guten Mann</i>	<i>iyi bir adam</i>	(unu) bonan viron
<i>den guten Mann</i>	<i>iyi adamı</i>	la bonan viron

(3 elementoj, inkl. genitivon kaj dativon).

La nombro da elementoj reduktiĝas ĉe la inaj substantivoj.

Ina genro singulara:

Germane	Turke	Esperante
<i>eine gute Frau</i>	<i>iyi bir kadın</i>	(unu) bona virino
<i>die gute Frau</i>	<i>iyi kadın</i>	la bona virino
<i>einer guten Frau</i>	<i>iyi bir kadının</i>	de (unu) bona virino
<i>der guten Frau</i>	<i>iyi kadının</i>	de la bona virino
<i>eine gute Frau</i>	<i>iyi bir kadına</i>	al (unu) bona virino
<i>der guten Frau</i>	<i>iyi kadına</i>	al la bona virino
<i>eine gute Frau</i>	<i>iyi bir kadın</i>	(unu) bonan virinon
<i>die gute Frau</i>	<i>iyi kadını</i>	la bonan virinon

La ina genro ne plialtigas la nombron da formoj, ĉar ĉiuj ĝiaj finaĵoj troviĝas inter la viraj.

Neŭtro singulara:

Germane	Turke	Esperante
<i>ein gutes Bier</i>	<i>iyi bir bira</i>	(unu) bona biero
<i>das gute Bier</i>	<i>iyi bira</i>	la bona biero
<i>eines guten Bieres</i>	<i>iyi bir biranın</i>	de (unu) bona biero
<i>des guten Bieres</i>	<i>iyi biranın</i>	de la bona biero
<i>einem guten Bier(e)</i>	<i>iyi bir biraya</i>	al (unu) bona biero
<i>ein gutes Bier</i>	<i>iyi bir bira</i>	(unu) bonan bieron
<i>das gute Bier</i>	<i>iyi birayı</i>	la bonan bieron

Per la neŭtraj formoj la nombro da elementoj kreskas je unu. En la singularo la virgenra kaj neŭtra krome havas apartan dativan formon: "*Gutem Wein sagt man nicht nein.*" („Al bona vino oni ne neas“). Ĉi-pere la elementaro pliiĝas je unu plua.

En la **pluralo** same ne plimultiĝas la nombro da finaĵoj:

kazo	germane	turke
nom.	<i>gute Männer/Frauen/Biere</i>	<i>iyi adam(lar)/ kadın(lar)/ bira(lar)</i>
nom. dif.	<i>die guten Männer/Frauen/Biere</i>	<i>iyi adamlar/ kadınlar/ biralara</i>
gen.	<i>guter Männer/Frauen/Biere</i>	<i>iyi adam(lar)ın/ kadın(lar)ın/ bira(lar)ın</i>
gen. dif.	<i>der guten Männer/Frauen/Biere</i>	<i>iyi adamların/ kadınların/ biraların</i>
dat.	<i>guten Männern/Frauen/Bieren</i>	<i>iyi adam(lar)a/ kadın(lar)a/ bira(lar)a</i>
dat. dif.	<i>den guten Männern/Frauen/Bieren</i>	<i>iyi adamlara/ kadınlara/ biralara</i>
aku.	<i>gute Männer/Frauen/Biere</i>	<i>iyi adam(lar)/ kadın(lar)/ bira(lar)</i>
aku. dif.	<i>die guten Männer/Frauen/Biere</i>	<i>iyi adamları/ kadınları/ biraları</i>

Ĉar ankaŭ ĉi tie la nombro da elementoj ne kreskis, eblas konkludi, ke la germana adjektivo funkcias per kvin finaĵoj: **-e/-em/-en/-er/-es**.

Malgraŭ la limigita nombro da finaĵoj la uzado de la germana adjektivo forte dependas de la rolo de la artikoloj, ties parencoj la posesivoj kaj demonstrativoj, kaj diversaj aliaj kundeterminantoj. En la ekzemploj videblas ke por turka lernanto la vera problemo estas la distribuo de la relative malmultaj finaĵoj konekse kun la ilin influantaj vortoj.

La artikoloj transprenas la precizigan taskon, indikante la unuopajn gramatikajn kazojn, dum la adjektivo ricevas nur la „malfortajn“ finaĵojn **-e** kaj **-en**. Kiam la artikoloj mankas, la adjektivo mem transprenas la precizigan funkcion.

Konsiderante la fakton ke la turka ne konas difinitan artikolon, la germana, en kiu ĝi plenumas multajn funkciojn de la deklinacio, prezentas tute novan vortformon kun komplika morfologio (3 genroj, 3 ĝis 4 kazoj, singularo kaj pluralo pli abunde esprimataj ol en la turka).

Adiciante la 3 genrojn, la kazojn kaj la pli vastan uzadon de la pluralaj finaĵoj, ni atingas relativan malfacilecon ĉe la germana adjektivo de proksimume 12 elementoj.

La hispana adjektivo

En la hispana la laŭsistema adjektivo akordas epitete kaj predikate laŭ genro kaj nombro kun la determinata substantivo kaj staras post ĝi.

La gramatika kazo ne ludas rolon. La laŭsistemaj adjektivaj finaĵoj de la hispana estas:

Nombro	Masklo	Feminino	Komuna genro
Singulano	-o	-a	konsonanta finaĵo aŭ -e
Pluralo	-os	-as	-es

el hombre bueno *la mujer buena*
los hombres buenos *las mujeres buenas*

Adjektivaj kun konsonanta finlitero tamen indikas neniun genran diferencigon, sed nur komunan nombran:

el libro azul *la casa azul*
los libros azules *las casas azules*

Ankaŭ adjektivaj finiĝantaj per -e indikas neniun genran diferencigon kaj havas la saman nombran finaĵon:

el hombre grande *la mujer grande*
los hombres grandes *las mujeres grandes*
el muchacho inteligente *la muchacha inteligente*
los muchachos inteligentes *las muchachas inteligentes*

La adjektivo **grande** cetere havas devian sencon kaj formon en antaŭsubstantiva pozicio:

el hombre grande = la grand(statur)a viro
el gran hombre = la grand(signif)a viro

Adjektivaj de kvanto metiĝas antaŭ la substantivon.
muchas hijas = multe da filinoj

La relative simpla paradigmo de la hispana adjektivo kun ses finaĵoj kaj malmulte da facile parkerigeblaj variaĵoj estas unu el la plej lerneblaj de la hindeŭropaj lingvoj. (7 elementoj). (vd. ankaŭ "Akor-do de substantivo kaj adjektivo").

La franca adjektivo

En la franca la adjektivo epitete kaj predikate akordas laŭ genro kaj nombro kun la substantivo, ne indikante la kazon. Laŭsisteme ĝi staras post la substantivo, sed estas multaj esceptoj.

Male de la turka, la franca emas mutigi multajn literojn, precipe vortfine, sed montras ilin skribe. Sekve ankaŭ la finaĵoj de genro kaj nombro ofte ne prononciĝas, sed tamen havas efikon al la prononco de la resto de la vorto kaj ĉe la interligo de la vortoj ("*liaison*").

La baza formo de la adjektivo laŭtradicie estas la vira, kvankam la etimologio tion kontraŭdiras. La adjektivo **beau**, ekzemple, devenas de prafanca **bello** (kp. la italan). Tio respeguliĝas en la ina formo **belle** (< bella) kaj la speciala antaŭvokala virgenra formo **bel** (v. sube).

Pro tiu tradicia vidpunkto la gramatikoj ofte parolas pri la "inigo" de la adjektivaj, kiu en la franca havas 12 regulojn por la singularo:

1. -x > -se: *heureux* > *heureuse* [ø'rø > ø'röz] = „feliĉa“

Escepto a: -x > -ce: *doux* > *douce* [du: > du:s] = „dolĉa, mallaŭta“

Escepto b: -x > -sse: *faux* > *fausse* [fo: > fo:s] = „falsa, malĝusta“;
roux > *rousse* [ru: > ru:s] = „ruĝ(har)a“

Escepto c: -x > -ille: *vieux* > *vieille* [vjö: > vjej] = „maljuna, malnova“

2. -f > -ve: *vif* > *vive* [vif > viv] „vigla, viva“; *neuf* > *neuve* [nö:f > nö:v] = „nova“

3. -c > -que: *public* > *publique* [py'blik] „publika“; *turc* > *turque* [ty:rk] = „turka“

Escepto a: -c > -cque: *grec* > *grecque* [grek]

Escepto b: -c > -che: *blanc* > *blanche* [blā(k) > blāš]; *franc* > *franche* [frā(k) > frāš];

Escepto c: -ec > -èche: *sec* > *sèche* [sek > seš] = „seka“

4. g > gue: *long* > *longue* [lō: > lō:g] = „longa“; *aigu* > *aiguë* [egy:’ə] = „akra“ (**u** prononcata)

5. -er > -ère: *léger* > *legère* [le:’je: > le:’jer] = „leĝera“; *cher* > *chère* [ŝer] = „kara, multekosta“; *fier* > *fière* [fje:r] = „fiera“

6. -eur > -euse: *flatteur* > *flatteuse* [fla’tö:r > fla’tö:z] = „flata“, *songeur* > *songeuse* [sō’jör > sō’jöz] = „rev(em)a“.

Escepto: -eur > -eure: latinidaj komparativoj: *majeur*, *mineur*, *meilleur*, *intérieur* = „pli aĝa, pli juna, pli bona, interna“

7. -teur > trice: *indicateur* > *indicatrice* [ēdika’tör > ēdika’tris] = „indika“

8. -n > -nne: *bon* > *bonne* [bō: > bōn]; *chrétien* > *chrétienne* [kre:s’jē > kre:s’jen] = „kristana“.

Escepto: *in* > *igne*: *bénin* > *bénigne* [be:’nē > bé’ni:nj] = boneca“; *malin* > *maligne* = „malboneca, maligna“

9. -t > -tte: *muët* > *muette* [my'e: > my'et] = „muta, silenta“, *sot* > *sotte* [so: > sɔt] = „stulta“

Escepto a: -ot > -ote: *bigot* > *bigote* [bi'go: > bi'go:t] = „bigota“; *dévo*t > *dévot*e = „pia“; *idiot* > *idiote* = „idiota“

Escepto b: -et > ète: *discret* > *discrète* [dis'kre: > dis'kret] = „diskreta“

Escepto c: -i > ite: *favori* > *favorite* [favo'ri > favo'rit] = „preferata“ (spec. kazo)

10. êe -el, -eil, -il -l > -lle: *cruel* > *cruelle* = „kruela“; *pareil* > *pareille* [pa'rej] = „simila, egala“; *gentil* > *gentille* [jã'til > jã'tij] = „simpatia, ĝentila“

Escepto a: -al > -ale: *général* > *générale* [je:ne:'ral] = „ĝenerala“

Escepto b: -ol > -ole: *espagnol* > *espagnole* [espan'jol] = „hispana“

11. -s > -se: *gris* > *grise* [gri > griz] = „griza“

Escepto a: s > sse: *bas* > *basse* [ba: > bas] = „malalta“; *gras* > *grasse* [gra: > gras] = „grasa“; *las* > *lasse* = „laca“; *gros* > *grosse* [gro: > grɔs] = „dika“⁽²⁾; *épais* > *épaisse* [e:pe: > e:'pes] = „dika“

Escepto b: -ès > -esse: *exprès* > *expresse* [eks'pre > eks'pres]

Escepto c: -is > îche: *frais* > *fraîche* [fre > freŝ] (speciala kazo)

12. triforma singularo (antaŭvokala): *bel ami*, *quel honneur*

a. *beau* – *bel* – *belle* = „bela“

b. *nouveau* – *nouvel* – *nouvelle* [nu'vo: - nu'vel] = „nov(ec)a“

c. *vieux* – *vieil* – *vieille* = „maljuna, malnova“

ĉ. *mou* – *mol* – *molle* [mu: - mol] = „mola“

d. *fou* – *fol* – *folle* = „freneza, fola“

Pluraligo de adjektivoj:

Laŭsisteme la pluraligo de la adjektivo okazas per aldono de la finaĵo -s. Validas la samaj reguloj kiel por la substantivoj.

1. Adjektivoj finiĝantaj per -s aŭ -x ne ricevas pluan -s: *un gros livre*, *de gros livres*.

2. -al > -aux: *général* > *généraux* [je:ne:'ro:]; *numéral* > *numéraux*

Esceptoj (tamen -s): a. *fatal(s)* = „fatala(j)“, neevitebla(j)“, b. *final(s)* = „fina(j)“, c. *natal(s)* = „naska(j)“, ĉ. *naval(s)* = „mara(j)“, naŭtika(j)“, d. *bancal(s)* = „o-gamba, malstabila“.

3. -eau > -eaux, -eu > eux: *nouveau* > *nouveaux* = „nova(j)“, *hébreu* > *hébreux* = „hebrea(j)“.

Esceptoj (tamen -s): *bleu* > *bleus* = blua(j), *feu* > *feus* = mortinta(j).

En kelkaj specialaj funkcioj certaj adjektivoj (*nu*, *demi*, *possible*, *mi*) estas senŝanĝaj. Krome unuopaj adjektivoj estas uzeblaj adverbe (vd. La adverbo). La pozicio de la adjektivo estas sufiĉe komplika lingvero en la franca. Ĉefa regulo estas, ke la antaŭsubstantiva adjektivo validas kiel pli malforte emfazata rilate al la substantivo ol la postsubstantiva.

Antaŭsubstantive la adjektivo nur plivastigas la signifon de la substantivo, sed ĝin ne esence diferencigas de aliaj samspecaj personoj aŭ objektoj. Postsubstantive ĝi emfazas ecojn kiuj diferencigas la substantivon de aliaj personoj aŭ objektoj samspecaj.

Por ne trarompi la kadron de la studo sufiĉas konstati ke la detalado de la pozicia demando ampleksas almenaŭ tri kategoriojn kun pli firmaj pozicioj:

1. nur antaŭsubstantivaj (15) adjektivoj
2. preskaŭ nur postsubstantivaj (6 reguloj)
3. adjektivoj ĉe kiuj la pozicio diferencigas la signifon (min. 12)

Resume konstateblas ke la franca adjektivo postulas altan nombron da parkeraĵoj kaj gramatikaj decidoj. (min. 92 elementoj)

Post ekzameno de kvin el la celloj eblas konstati provizoran rangordon de relativa facileco por turka lernanto:

1. Angla
2. Esperanto
3. Hispana
4. Germana
5. Franca

La rangordo estos kompletigita post la pritrakto de la rusa adjektivo.

Fontoj

Por la turka:

Tekinay: Günaydın, Teil I, Dr. Ludwig Reichert Verlag, Wiesbaden, 1985

G. L. Lewis: Teach Yourself Turkish, The English Universities Press Ltd, Londono, 1953/1963

Jonathan Pool: Esperanto öğrenelim, Habora Kitabevi, İstanbul, jaro ne indikita

Çakır: Pons Grammatik kurz & bündig Türkisch, Ernst Klett Sprachen GmbH, Stuttgart, 2005

Por la angla:

vd. "La angla kaj rusa komparacioj"

Por Esperanto:

Kalocsay & Waringhien, Plena Analiza Gramatiko, UEA, Rotterdam, 1980

Willkommen: Esperanto-Grammatik, Helmut Buske Verlag, Hamburg, 2001

Por la franca:

Blanche: Französische Grammatik Leicht verständlich für jedermann, Buch und Zeit Verlagsgesellschaft mbH, 1967 – *Forst*: Pons Grammatik kurz & bündig Französisch, Ernst Klett Sprachen GmbH, Stuttgart, 2005

Por la germana:

Benzer: „Eine kontrastiv linguistische Darstellung der Adjektive in der türkischen und der deutschen Gegenwartssprache“. Inaugural-Dissertation, Universität Bochum, 2000.

Neubold: Pons Grammatik kurz & bündig Deutsch, Ernst Klett Sprachen GmbH, Stuttgart, 2008

Por la hispana:

Jackson & Rubio: Spanish Made Simple, Made Simple Books, Inc., New York, 1955/1958

Segoviano: Pons Grammatik kurz & bündig Spanisch, Ernst Klett Sprachen GmbH, Stuttgart, 2008

Notoj

(1) La termino "tenco" estas nek en PIV nek en PAG, sed mi jam legis ĝin kaj ne memoras la fonton. "Tenco" miaopinie superas al "tempo" (PAG) pro tio, ke ekz. la kondicionalo, volativo kaj infinitivo striktasence ne havas tempan, sed modan sencon. "Tenco", kvankam etimologie parenca kun "tempo", pli taŭgas por reprezenti ĉiujn verbajn funkciojn.

(2) La francaj "gros" kaj "épais" signifas "dika": la unua en la senco de "fortikeco", la dua en la senco de "pezeco kaj la sekva limigo de movkapablo".

(daŭrigota)

Adreso de la aŭtoro

Gerald TUCKER

Breitenbergstrasse 7

DE – 86163 Augsburg / GERMANIO

<g.tucker@gmx.de>

Priaŭtora informo

Gepatra lingvo: uson-angla. Unua fremdlingva kontakto: hispana. Formala lingvolernado: la francan kaj germanan en lernejo, la rusan en la armeo (intensa kurso), la turkan en universitato. Aŭtodidakte: Esperanton, lingvistikon. En 1970 la aŭtoro tradukis en Esperanton la libron "La besto-farmo" de *Orwell*, kaj ekde 1972 li estas fakestro por ekzamenoj de Germana Esperanto-Instituto.

*Recenzo***Cetere, vivu la viziuloj! Honoron al ili!**

Recenzo pri

"Ĉu kultura integriĝo en Eŭropo?"

Jes, sed nur per demokratia simbiozo de la kulturoj"

Jiri LAUBE

Dobřichovice: KAVA-PECH, 2007, 31 p., 20 cm.

ISBN 9788085853964. € 2,10

Jen teksto de vera humanisto. La respondoj de *Laube* al la aktuala problemo de kultura Eŭropa integriĝo baziĝas sur kultur-historiaj, precipe religiaj konsideroj, en konkordo kun la opinio de *Madeleine Albright*, ke "la ŝanĝo, kiun oni aktuale registras, estas nova kresko de influo de la religio" (p. 8). Mi persone dubas, ĉu tia aserto kaptas la ĉefan faktoron de la niatempaj eventoj. Pli verŝajne rolas neniam antaŭe konata decidkapablo de ekonomiaj kaj politikaj interesoj de hegemoniistoj.

Per klaraj, mallongaj frazoj, sintezoj de konoj kaj propraj pensoj, *Laube* argumentas la neceson kaj eblecon de paca kunvivado de la nuntempaj kulturoj (judismo, islamismo, kristanismo). La harmonia kunekzistado estas ebla ne nur pro raciaj kialoj, sed ankaŭ danke al malnovaj, komunaj radikoj; bedaŭrinde, montras la aŭtoro, la reciproka ignorado dum la historio damaĝis ĉiujn. *Laube* konscias, ke la "troa materia kaptiteco de la homo kaj de la socio" estis longtempe negativa faktoro por la kunvivado de popoloj kaj kulturoj, sed nune, optimisme, li opinias ke, bonŝance, tiu faktoro "atingis sian kulminon" kaj nun "jam aŭguriĝas nova, sanoplena kaj ekvilibra vivo, kie la spirito gvidas la aktivadojn de la socio".

Ankaŭ ĉi-rilate mi estas multe pli skeptika. *Laube* prave kredas je la forto de la racio, tial li trovas historiajn kaj praktikajn argumentojn por demokratia simbiozo de la nunaj Eŭropaj kulturoj. Unu tia argumento baziĝas sur interesa paralelo: kaj la judismo kaj la islamismo